# *Pritaksas Miguel Díaz-Canel programojn pri laboro kaj demografia dinamiko.*



Havano, 17 jul (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel pledis por labordono al laboristoj haltigitaj,  en agadoj bezonataj de la nacia ekonomio.

Dum kunsido  por pritaksi la programon de laborloko kaj la atenton al la demografia dinamiko de la lando, la kuba ?tatestro elstarigis la eblecon plibonigi la plurlaborecon, kio estas nuntempe labormaniero efektivigata de pli ol 200 mil personoj, krom evoluigi la laboron je distanco.

La? raporto de la nacia televido, la kuba ?tatestro anka? sin esprimis pri la entreprenaj grupoj, kiuj havas pli da entreprenoj ol tiuj kiujn ili povas atenti, kaj same priparolis  la kunekziston, kiu povas ekzisti  inter la malgranda kaj la meza entreprenoj jen en la ?tata kiel en  la privata sektoro.

Dum la kunsido oni pritraktis la temon de la demografia dinamiko en Kubo, kaj oni informi?is pri la decidoj adoptataj por ke la paroj kiuj ne povas havi infanon, ricevu la koncernan traktadon por tion prizorgi.

Oni anka? taksis la evoluon de la temoj koncerne al rehabilitigo, subtenado kaj konstruado de lo?ejo por patrinoj kun tri a? pli da infanoj malpli ol 12-jaraj, politiko de stimulo ekzistanta en la insulo.

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/196343-pritaksas-miguel-diaz-canel-programojn-pri-laboro-kaj-demografia-dinamiko](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/196343-pritaksas-miguel-diaz-canel-programojn-pri-laboro-kaj-demografia-dinamiko)

**Radio Habana Cuba**